

5-4252/81(1988)

1988 junio

81a jaro

n-ro 990 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



1987

EN

PERSPEKTIVO

Vi trovos,

ke de movada periferio ni saltis al movada centro: post legantara maja numero venas estrara junia. Jen interesa okazo por komparoj, se iuj tiel emas. Dum la majaj artikoloj atendis pliajn agojn de la Asocio, la jena raporto skizas ĉion, kion sukcesis atingi dekduo da oficistoj, ok estraranoj kaj granda, malkohera reto de komitatanoj, perantoj, delegitoj kaj komisiitoj. Tute ne neglektindajn atingojn, cetere — sed tamen, la demando leviĝas, se oni volas fari pli (kaj kiu ne volas?), de kie venu la aldonaj mon-kaj hom-fortoj? Eĉ pli racia utiligo de nunaj strukturoj, kiel la UK, bezonus konsiderindan investon de tempo kaj energio: du aferoj, da kiuj UEA ne disponas senliman kvanton!

Gravas, do, tralegi ĉi tiun raporton atente, kaj efektive pensi pri la vasta laboro kiu kuŝas malantaŭ tiu dekkvino da paĝoj. La Estrara Raporto estas provo breĉi la murojn de anonimeco, kiuj apartigas la postenulojn de la membraro, malhelpante kunparoladon kaj kunagadon. Sed la breĉo bezonas ambaŭflankan prilaboron, antaŭ ol ĝi fariĝos pordego.

La Raporto mem estas komuna produktaĵo. La estraranoj liveras la bazajn tekstojn, la koncernaj oficistoj aldonas kaj detaligas laŭ siaj scioj. Tio estas unu el la kialoj, ke vi ricevas tiun ĉi numeron pli malfrue ol la lastatempa kutimo: ĉar kunlaboro, ĉie kaj ĉiam, estas malpli facila kaj pli temporaba ol memstara aktivado. Baf! Jen unu el la penigaj devoj, kiun neeviteble surprenas movadano por mondiskala interkompreniĝo. Tiu penso konsolu vin, dum vi atendas la revuon en malfrua julio!

Enhavo

- 101 Enkonduko; Ĝeneralaĵoj; Administrado
 - 102 Financo
 - 103 *Anonco: Ĉiuj Stafeto-libroj denove aĉeteblaj!*
 - 104 Institucio Hodler; Periodaĵoj kaj serioj
 - 105 Kongresoj
 - 106 Jubilea Jaro, informado
 - 107 Eksteraj rilatoj
 - 108 Kulturo kaj edukado
 - 109 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
 - 110 Landa kaj regiona agado
 - 111 Faka agado
 - 112 Esploro kaj dokumentado
 - 113 Finaj vortoj; Financaj aldonajoj al la raporto: Spezokonto
 - 115 Bilanco
 - 116 Evoluo de fondaĵoj; Evoluo de Rezervoj (fino de la raporto)
 - 118 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
 - 120 Esperanto en radio (tabelo de horoj kaj frekvencoj)
- Novaĵoj el la Centra Oficejo

La kovrilo

La Solena Inaŭguro en Varsovio (aŭ, pli ĝuste, unu el la du, kiujn trudis al ni salonego nur trimilseĝa) restos en la memoroj de multaj la simbola kulmino de la pasinta jaro. Decas konscii, tamen, ke sesmil homoj estas nur malgranda ono de la tuta movado, kaj ke UEA — malgraŭ ĉiuj membrorekordoj — estas nur unu ero de la Esperanta komunumo. Ideale, ĝi estus la nabo, kie ĉiuj radradioj renkontiĝus por kunagi efike en la plu-rulado. Kvankam ni ankoraŭ ne atingis tion, la tendenco pli ĝenerale kaj partopreneme utiligi UEA ja klare ekzistas; kaj tial ni akceptu la kovrilajn aplaŭdantojn kiel simbolajn reprezentantojn de la centmiloj, kiuj forestis sed siamaniere, sialoke, kontribuis al nia komuna Jubileo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo: Neil Salvesen

Estrararo de UEA

Prezidanto (planado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (faka agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 megy h.

Estrarano (administrado, kongresoj, financoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Universala Esperanto-Asocio en la jaro 1987

1. ENKONDUKO

Ĉi tiu Estrara Raporto traktas la agadon de UEA dum la kalendaro jaro 1987, kiam la tuta Movado prifestis la Centjaran Jubileon de la Internacia Lingvo. Konforme al la Statuto de la Asocio, la Raporton ricevas ĉiuj individuaj membroj de UEA, do ankaŭ tiuj al kies adresoj ne iras regule ĉi tiu revuo. Ankaŭ la aligitaj membroj (kaj kiu ajn alia) povas ricevi ekzempleron de la Raporto kontraŭ skriba peto al la Centra Oficejo.

La Estrara Raporto estos diskutita en la Unua Ĝenerala Kunsido de UEA dum la 73a UK en Roterdamo. Tiu diskuto estos malfermita al ĉiuj ĉeestantoj, kaj la Estraro esperas, ke multaj eluzos la okazon por fari sian kritikan prijuĝon de la pasintjara laboro de la Asocio.

Sur la sekvaj paĝoj vi trovos iuspecan resumon de la plej gravaj atingoj (kaj malsukcesoj) dum la Jubilea Jaro. Kiel kutime, sed ĉi-foje eĉ aparte, montriĝis tre malfacile enpuŝi ĉion en limigitan spacon. Multo okazis dum 1987. Sur kelkaj kampoj la Movado notis tute spektaklajn rezultojn, sed troveblas ankaŭ agadkampoj, kiujn la Jubileo kvazaŭ ne tuŝis. Kvankam ni provis enfokusigi la rektan laboron de UEA, denove montriĝis maleble limiĝi nur al tio. Ne eblas paroli izole pri UEA, pro la simpla fakto, ke ĝi estas integra parto de la tutmonda Esperanto-komunumo. Tio en si mem estas pozitiva konstato.

2. ĜENERALAJĜOJ

1. Statuto kaj Ĝenerala Regularo: Ne okazis ŝanĝoj en 1987.

2. Honora Patrona Komitato: Forpasis en novembro Paul Neergaard, kiu faris elstaran kontribuon al la prestiĝo de Esperanto en sciencaj rondoj dum pluraj jardekoj. Elektiĝis d-ro Chang Choong-sik, rektoro de la Universitato Dankook en Seŭlo.

3. Honoraj membroj: Elektiĝis kvar novaj honoraj membroj: prof. B. Popović (Jugoslavio), J. Toczyski (Pollando), d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof (Francio), kaj mag. W. Auld (Britio). Forpasis d-ro P. Denoël kaj prof. I. Szerdahelyi. La Asocio havis je la jarfino 30 honorajn membrojn.

4. Komitato: La Komitato nun konsistas el entute 85 membroj (63A, 7B, kaj 15C), plus 6 observantoj. Plena listo aperas en la Jarlibro 1988. La Komitato kunsidis en Varsovio. Venontaj elektoj okazos en 1989.

5. Estraro: La naŭkapa Estraro perdis sian fakulon pri financo printempe, kiam demisiis V. Sadler pro malsano. En Varsovio elektiĝis G. C. Fighiera, kiu tamen neniam vere instaligis antaŭ ol anonci jarfine sian eksigon. Tial mankis dum la plejparto de la jaro estrarano pri financo. La novstila labormetodo principe enkondukita en Pekino, nome sektoroj por interna kaj ekstera agadoj, kiuj funkciis ankaŭ memstare, ne realiĝis. La Estraro kunsidis en

aprilo en la CO, kaj en Varsovio; poste okazis teknika kunsido en Roterdamo komence de oktobro, kiun tamen ĉeestis 7 estraranoj.

6. Komisionoj kaj komisiitoj: Plena listo de komisionoj kaj komisiitoj ne aperis, kvankam kelkaj daŭre laboras (Belartaj Konkursoj, virina agado, scienco, landa agado, elektoj, kongresoj, financo). Kiel komitataj revizoroj agas d-ro W. Bormann kaj F. de Geus, sed la profesia revizoro L. Hordijk demisiis. La komisiono por la Belartaj Konkursoj ricevis kiel novajn membrojn G. Konisi kaj L. Knoedt, dum la sekretarian taskon transprenis O. Buller.

7. Laborplano: 1987 estis la fina jaro de la laborplano 1983-1987, kaj la Jubilea Jaro mem pintis la kvinjaran periodon. Pretigo de plia kvinjara plano progresis, kaj estas antaŭvidite, ke la Komitato traktos ĝin dum la 73-a UK.

8. Landaj kaj Fakaj Asocioj: La nombro de la aliĝintaj landaj asocioj restis 44. El la listo de la fakaj asocioj kunlaborantaj kun UEA forfalis unu: Budhana E-Ligo ĉesis funkcii. Inter tiuj ankoraŭ neligitaj al UEA estas novaj: ateismo (ATEO), ministoj (IMES), spiritismo (SESVL), dum provizore estas for tiu pri juro (IEAJ). UEA en la jarfino havis 5 aliĝintajn kaj 31 kunlaborantajn fakajn asociojn.

3. ADMINISTRADO

1. Oficistoj: La jaro estis relative stabila en la Centra Oficejo, kvankam okazis grava ŝanĝo kiam fine de oktobro foriris la tiama direktoro O. Buller. Lin anstataŭis en novembro N. Salvesen. La meza nombro de oficistoj kaj volontuloj estis la ekvivalento de 11,2 plentempaj homoj. S. Milojević (ĝenerala direktoro), P. Zapelli (kongresa administrado), F. J. Moleón (Jarlibro, Katalogo), J. Dukel (grafikaj laboroj), M. Fettes (*Esperanto*), kaj M. Stanley (financo) laboris plentempe. Parttempe tra la jaro laboris K. Trimborn (libroservo), R. Moerbeek (ekspedo, provlegado), I. v. d. Krans (librotenado). J. Exmann iĝis parttempa kaj transprenis sekretariadon de L. Faaij kiam ŝi foriris en septembro. Ges-roj Merceij prizorgis purigadon.

2. Volontula Servo: Regula helpanto estis J. Jurczyński, kiel administranto de salajroj kaj Institucio Hodler. R. Blaine senpage laboris 3 monatojn pri la Biblioteko. C. Ford deĵoris ekde oktobro, kaj ĉefe okupiĝis pri la Katalogo. Jarfine kunlaboris R. McCoy kaj J. Parzyszek. Samtempe ekfunkciis volontula taĉmento de lokaj esperantistoj por helpi je ekspedlaboroj.

3. Domo: La domo taŭge servas post la rekonstruoj. Vizitantoj ricevas bonan impreson, kaj nia lokiĝo en Roterdamo montriĝas trafa, i.a. pro la glataj poŝtaj kaj aliaj servoj.

4. Aŭtomatigo: Ni pligrandigis la memorkapaciton kaj rapidecon de la komputilo per aĉeto de novaj komponantoj. La enhavo de la Katalogo estas nun en la komputilo;

aliflanke la Libroservo ankoraŭ ne estas aŭtomatigita tiel ke fakturado samtempe ĝisdatigu la stokon. F. de Geus daŭre konsilis kaj disponigis sian helpon, kiel same faris H. Bourguignon.


5. Ekipaĵoj: La telekso, kiun subvencias Oomoto, tre utilas, aparte por kongresaj komunikaĵoj.

6. Grafika Centro Antverpeno: Laŭ komitata rekomendo, fine de 1987 estis interkonsentite, ke Flandra Esperanto-Ligo transprenu de UEA posedon de la Grafika Centro Antverpeno. Financa rezulto de GCA en 1987 montriĝas post diversaj interkonsentoj preskaŭ ekvilibra el vidpunkto de UEA. Tamen, ankaŭ estonte restos kunlaboro pri pluraj gravaj eldonaĵoj.

7. Membraro: En 1987 UEA registris rekorde entute 43 642 membrojn, el kiuj 7 291 estis individuaj membroj. El tiuj, Membroj kun Gvidlibro, en sia dua jaro kiel nova kategorio, kreskis ĝis 642; la Membroj kun Jarlibro ĝis 1 417, kaj la Membroj-Abonantoj ĝis 3 922. Estis ioma refalo en la Dumvivaj Membroj, ĝis 944. La Gvidlibro kiel aparta depresaĵo komencas ludi pli pozitivan rolon en la informado pri UEA, kaj tial la Estraro proponas al la Komitato en Roterdamo daŭrigi tiun membrokategorion.

NE PLU ENVIU LA FRANCOJN!

Tiu ĉi, eble la plej bona popularscienca verko iam verkita pri Esperanto, aperis ĉe la Universitata Eldonejo de Francio en 1973, poste en la germana kaj hispana lingvoj, kaj nun legeblas en aktualigita Esperanta traduko de la aŭtoro mem. Ne plu lasu la francojn esti pli bone informitaj ol vi, movadano!



Esperanto: lingvo — literaturo — movado. Pierre Janton. Roterdamo: UEA, 1988. 120p. 21cm. ISBN 92 9017 034 4. **Prezo:** 18,00 gld. plus sendokostoj. **1/3-a rabato** ekde tri ekzempleroj.

Inter la aligitaj membroj, la plifortiĝo okazis ne ĉe la junaj (9 305), sed ĉe la pli aĝaj (27 046). La detaloj kaj kompara statistiko troviĝas en la revuo *Esperanto*, marta numero, p. 59.

8. Societo Zamenhof: Estis 197 membroj de Societo Zamenhof en 1987, kompare kun 184 en 1986. Okazis la tradicia akcepto dum la kongreso en Varsovio.

9. Delegita Reto: La nombro de individuoj en la Delegita Reto kreskis de 2 377 en 1986 ĝis 2 450 en 1987, kaj la landoj de 71 ĝis 74. La sumo de delegitecoj tamen iomete falis, kaj distribuiĝis jene: delegitoj 1 279, vicdelegitoj 178, junularaj delegitoj 103 kaj fakdelegitoj 1 759, sume 3 319 anstataŭ 3 420; la falo kuŝas ĉe la fakdelegitoj. Resuma statistiko laŭlanda troviĝis en la Jarlibro 1987, p. 392/3. La Jarlibro 1988 (p. 379/80) indikas, ke tiu

kresko parte ŝuldiĝas al manko de kontrolado pri la efektiva validado de kelkaj dekoj da nomoj; tial la vera delegitaro estas malpli multnombra.

10. Jarlibro: La Jarlibro estis ekspedita al la membroj en majo. La unuaj 128 paĝoj konsistigis apartan Gvidlibron, kiu iris al membroj en la kategorio MG. La tuto estis 416-paĝa, kaj interalie prezentigis "Historio de Esperanto en datoj". La Jarlibro estis kompostita, enpaĝigita kaj fotita kunlabore inter la CO kaj GCA.

11. Eldona agado: Aperis la popularscienca libro *Vetero kaj klimato de la mondo* eldonita de UEA: la tradukon el la angla originalo faris Kris Long, kaj la eldono okazis laŭ kontrakto kun Cambridge University Press. Certe la laboro por la Jubilea Jaro, kaj aparte por la amasa kongreso en Varsovio, iom bremsis la eldonagadon. La Jubilea Serio estis la ĉefa viktimo, sed aliaj promesitaj eldonaĵoj ankaŭ suferis. Tamen laboro estis farita dum la jaro. *La fenomeno Esperanto* de W. Auld estis fintraktita (tiel ke ĝi aperis en aprilo 1988). Meze de la jaro UEA reeldonis la popularan lernolibron de A. C. E. Childs-Mee, *Saluton!* En oktobro aperis la valora libro *Studoj pri la internacia lingvo*, redaktita de M. Duc Goninaz kaj eldonita de AIMAV en kunlaboro kun UEA. Eldoniĝis dulingve (japana/E-o) ankaŭ *Socilingvistikaj aspektoj de la Internacia Lingvo*, materialo el la Tokia Simpozio en 1986.

12. Libroservo: Kvankam la vendoj en la Libroservo ja kreskis de 229 253 ĝis 279 089, tiu rezulto ne estis plene kontentiga. Parto de tiu sumo fontas el la kongresa libroservo, kie pro foje fortaj rabatoj ni ne ricevis la normalan profiton, kaj okazis ankaŭ inda ekspedo al triamondaj landoj, kio tamen estas io alia ol vendo al la kutima klientaro. Evidente en ambaŭ kazoj estas gajno en tio, ke libroj atingas esperantistojn kiuj ne povas facile aĉeti ilin normale. La Libroservo bezonis la spronon de nova katalogo, kiu aperis nur en februaro 1988, kaj oni sentis la mankon de propraj eldonaĵoj. Estas ankaŭ tiel, ke la Movado apenaŭ konsciiĝis pri la tajdo de novaj libroj el multaj fontoj, kaj informo pri ili per anoncubrikoj kaj recenzoj estas lame malrapida. Tamen la Libroservo konservas multajn titolojn por la eventuala mendo de esplorantoj kaj de novaj esperantistoj, kaj funkcias iom preter la limigoj kaj celoj de nemovada entrepreno.

13. Varbado: La Centra Oficejo dum la jaro traktis centojn da tre variaj informpetoj, kaj kutime temas pri dissendo de informa materialo kiu entenas varbfoliojn.

14. Kotizperantoj kaj Ĉefdelegitoj: Interkonsente kun la landaj asocioj, ŝanĝiĝis ĉefdelegitoj en Brazilo kaj Jugoslavio.

15. Poŝtmarkvendo: La vendo de uzitaj poŝtmarkoj denove kreskis, de 1 049 al 1 200 gld., sed la komisiito prezentas perspektivon de pli pozitiva saldo, surbaze de daŭra ensendo de poŝtmarkoj de la membroj al la CO.

4. FINANCO

1. Spezokonto: Se la malgrandeco de la negativa saldo jarfine estas la ĝusta indikilo pri la direkto de la financa evoluo en la koncerna jaro, tiam ni almenaŭ estas sur bona vojo, ĉar la negativaj saldoj tra la pasintaj kvar jaroj evoluis jene: 115 390 en 1984, 93 570 en 1985, 24 040 en 1986 kaj 14 985 en 1987. Ĉar 1987 estis la Jubilea Jaro kun multaj apartaj agadoj kaj tiurilataj financaj implico,

estas iuspeca sukceso, ke la negativa saldo ne fariĝis pli granda. Male al la kutimoj, tian saldon rezultigis ne buĝetitaj sed ne-realiĝintaj rimedoj (buĝeto 800 000; realiĝo 830 300 gld.), sed la kostoj, kiuj je 45 287 gld. superis la buĝetan sumon. Tie ĉefe rolis la salajroj (61 800 pli ol buĝetite), kvankam tiu salajrorezulto estas nur je 10% pli alta ol en 1984. Aliflanke, aliaj eroj, kiuj en la spezokonto koncernas la Centran Oficejon, notis ŝparon de pli ol 20 000 gld. Krome, la atingita rezulto ĉe la spezokonta ĉapitro pri la kongresoj kaj turismo (47 000 pli ol buĝetite) ne estus realigebla sen forta engaĝiĝo de la CO. Cetere, post plurjara manko de kelkaj oficistoj, en 1987 la CO preskaŭ kompletigis sian stabon.

Estas interese noti, ke la kotizoj rolis en la sumo de la rimedoj nur per 43% en 1987, dum en 1986 tio estis 46% kaj en 1985 eĉ 55%. Ĉu tio ne estas elokventa pravigo de la planata kotizaltigo por 1989?

Ĉe la rimeda flanko de la spezokonto okulfrapas la rezulto de la Libroservo: 68 973 (buĝeto: 120 000) gld. Tia rezulto estas pli bona ol unuavide ŝajnas pro jeno: la sumo de la vendoj tamen estis 279 000 (buĝeto: 300 000); la granda "negativa" diferenco venas el la pozitiva ŝanĝo en la valoro de la stokoj, kiuj malkreskis anstataŭ la buĝetita kresko. Tiu amasa liberiĝo de la malnovaj stokoj okazis pro la distribuo de libroj al la evolulandoj (el pekina kurzagajno) kaj pro la vendoj dum la UK en Varsovio.

2. Bilanco: Unuavide frapas la bilanca valoro de la asociaj posedaĵoj, kiuj kreskis je 318 000 en la pasinta jaro kompare kun 1986. Temas tamen pri la bilanca eniro de la granda donaco de 30 milionoj da enoj, kiu nun kreas apartan konton: Kapitalo Azio. Ĉe la aktivoj rimarkindas abundo da likida mono, kio parte ŝuldiĝas al prudenta decido ne investi en valorpaperojn antaŭ ol la merkato stabiligos post la perturboj en oktobro 1987. Tiel eblas defendi ankaŭ la malkreskon (45 700 gld.) ĉe la valorpaperoj, kvankam tie temas pli pri maturiĝo de obligacioj, ol pri perdo ĉefe ĉe akcioj (18 365 gld.). Krome, post la jarfino la valorpaperoj komencis regajni tiun provizoran perdon. La granda diferenco ĉe la konto debitoroj ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke tra 1987 solviĝis almenaŭ du grandaj malnovaj ŝuldoj. Institucio Hodler restas la sola granda debitoro. Laŭ rekomendo de la Komitato, la Antverpena Oficejo estos vendita al Flandra E-Ligo (kontraŭ la sumo de 114 540 gld.).

Ĉe la pasiva flanko de la Bilanco necesas atentigo, ke la granda sumo ĉe kreditoroj (preskaŭ tuta miliono da guldenoj) konsistas el centoj kaj centoj da malgrandaj sumoj, kio estas multe pli sekura ol se ĝin konsistigus nur kelkaj grandaj kreditantoj. La fondaĵoj montras la kutiman fluktuon en siaj rimedoj, krom la Jubilea Fondaĵo, kiu kreiĝis por la bezonoj en 1987.

Konkludo: Kvankam dum la jaro 1987 plurfoje ŝanĝiĝis estrara respondeculo pri financoj, ŝajnas ke tio ne havis negativajn sekvojn por la ĝenerala financa situacio de la Asocio. Tion oni unuavice devus danki al la koncernaj oficistoj, kiuj tamen bonvenigus pli da faka gvido sur ĉi tiu kampo. Estas notinde, ke vi ne trovos kun tiu ĉi raporto la kutiman proponon de la Buĝeto por la venonta jaro. La versio de buĝetpropono por 1989 iris de la Estraro al la Komitato, sed ĝi ne estis jam matura por publikigo kadre de la raporto. Vi do trovos ĝin en iu el la venontaj revu-numeroj, kiam la Komitato esprimiĝos pri ĝi.

Ĉiuj Stafeto-libroj denove aĉeteblaj!

UEA ĵus aĉetis la tutan stokon de ĉiuj libroj de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez. Kvankam multaj atendas ankoraŭ finpretigon de bindisto, jam estas aĉeteblaj ĉiuj titoloj listigitaj ĉi-sube. Kompreneble, UEA donas trionan rabaton ekde tri ekzempleroj.

titolo	aŭtoro/tradukinto	gld.
<i>Arĉoj</i>	G. Mattos	12,00
<i>La bela subtera mondo</i>	L. Tell	12,00
<i>Bona ŝanco</i> (prelegoj)	W. Bormann	18,00
<i>Cigana romancaro</i>	F. Lorca/F. de Diego	9,00
<i>Ĉielarko</i>	J. Baghy	9,00
<i>Duonvoĉe</i>	G.E. Maura	15,00
<i>El la polvo de la tero</i>	W.F. Rolt	12,00
<i>Eroj kaj aliaj poemoj</i>	M. Boulton	36,00
<i>Estiĝo de la tero kaj de la homo</i>	L. Tell	9,00
<i>Eta vivo</i>	C. Conterno	
	Guglielminetti	7,50
<i>Hamleto, princo de Danujo</i>	W. Shakespeare/ L.N.M. Newell	24,00
<i>Homoj sur la tero</i>	S. Engholm	30,00
<i>Humoroj</i>	W. Auld	9,00
<i>Invit' al japanesko</i>	Miyamoto M.	9,00
<i>Japana kvodlibeto</i>	komp. T. Nakamura kaj Miyamoto M.	7,50
<i>Kantoj kaj romanoj</i>	H. Heine/K. Kalocsay kaj G. Waringhien	39,00
<i>Maskerado ĉirkaŭ la morto</i>	T.S. Švarc	24,00
<i>Nova ezopo</i>	Š. Urban	7,50
<i>Nur tri kolorojn</i>	E. Urbanová	7,50
<i>Okuloj</i>	M. Boulton	15,00
<i>Ombroj de la kvara dimensio</i>	E. De Kock	7,50
<i>Pinta krajono</i>	R. Rossetti	7,50
<i>Provo alfronti la vivon</i>	I. St. Georgiev	7,50
<i>Reeĥoj: Jugoslavia poemaro</i>		7,50
<i>Reĝo Edipo kaj Antigona</i>	Sofoklo/D.B. Gregor	21,00
<i>Romeo, Julieta kaj la tenebro</i>	J. Otčenášek/V. Vána	7,50
<i>Sen paraŝuto</i>	P. Thorsen	9,00
<i>Soifo</i>	L. Tárkony	21,00
<i>Somermeznokta sonĝo</i>	W. Shakespeare/ K. Kalocsay	9,00
<i>Specimene</i>	H. Baupierre	15,00
<i>Sur la vivovojo</i>	A. Logvin	7,50
<i>Ŝtupoj sen nomo</i>	B. Ragnarsson	7,50
<i>La tempesto</i>	W. Shakespeare/ K. Kalocsay	9,00
<i>Topaze kaj La ŝipego "Tenacity"</i>	M. Pagnol/R. Bernard C. Vildrac/R. Bernard	18,00
<i>Unufingraj melodioj</i>	W. Auld	9,00
<i>Vitraro</i>	J. Francis	18,00
<i>Vivo de Gandhi</i>	E. Privat	15,00
<i>La vivo de la plantoj</i>	P. Neergaard	15,00

La torĉo pluiras.

5. INSTITUCIO HODLER '68

La nuna estraro de la Institucio konsistas el: G. Maertens (prezidanto), H. Bakker, A. Mertens Goossens kaj J. Verstraeten, dum kiel konsilanto funkcias E.J. Woessink. La provizora administranto J. Jurczyński daŭrigis la laboron tra la tuta jaro.

Post longa negocado kun Flandra Esperanto-Ligo kaj la Antverpena E-Klubo "La Verda Stelo" pri la luo de la antverpena domo de la Institucio, subskribiĝis novaj kontraktoj validaj ekde la 1-a de januaro 1987. Tiel la domo restas plene je la dispono de la Movado. La estraro konstatis, ke denove eblas forvendi kelkajn ĉambromojn en la antverpena domo; interesatoj skribu pri tio pere de la adreso de la CO de UEA.

La alia posedaĵo de la Institucio, loĝdomo en Roterdamo, restas plene forluta kaj enspezigas kontentigan monsumon. La antaŭaj klopodoj vendi tiun domon kaj normaligi la financon de la Institucio ne sukcesis pro malaltaj ofertoj, kvankam ne mankas interesitoj. Notindas, ke la roterdamaj prezoj de la ĉi-specaj nmoveblaĵoj daŭre kreskas.

La granda ŝuldo de la Institucio ĉe UEA malkreskis de 126 766 gld. fine de 1986 al 116 509 gld. fine de 1987. Tamen, la Estraro de UEA decidis ekde la komenco de 1988 fakturadi al la Institucio punrenton de 1% monate, tiel ke la ŝuldo repagiĝos multe malpli rapide. (La ŝuldo tamen malkreskis ankaŭ en la unuaj 5 monatoj de 1988 je pliaj 10 000 gld.)

Pro ĉio ĉi en 1987 ne eblis repreni la normalan kaj originan rolon de la Institucio: subteni gravajn kaj subtenindajn movadajn iniciatojn. Kvankam venis tri petoj, la estraro de la Institucio decidis asigni nur unu subvencion de 1 000 gld. al *Heroldo*, por disponigo de hispanlingva lernolibro al la latinamerika esperantistaro.

Resume necesas emfazi, ke la financa situacio de la Institucio Hodler '68 estas malfavora nur rilate la regulajn enspezojn, sed ne rilate la kapitalan valoron, ĉar la Institucio ja posedas la du domojn en Antverpeno kaj Roterdamo.

6. PERIODAĴOJ KAJ SERIOJ

1. Revuo Esperanto: Mark Fettes redaktis la 11 numerojn. Aperis entute 228 internaj paĝoj anstataŭ la kutimaj 220; la ekstraj aldoniĝis en julio-aŭgusto, kiam aperis speciala Jubilea Numero. La eldonritmon karakterizis iom-post-ioma plifruigo: la januara disendiĝis komence de februaro, la julia-aŭgusta meze de julio, dum la septembra aperis jam en la unuaj tagoj de la monato. Daŭra problemo estis la meza unusemajna prokrasto de la ekspedo tra Antverpeno, kiu finance estas pli avantaĝa.

Tre bonvena estis la kapablo komposti kaj pretigi la tutan materialon en la Centra Oficejo, post kelkjara uzo de la servoj de GCA. La surloka laboro de Jan Dukel ebligis i.a. eksperimenti pri la grafika aspekto, kiu tial iom ŝanĝiĝis tra la jaro; oni enkondukis novajn rubrikkapojn, reviziis la kolofonon kaj kovrilan titolon, kaj ekde la julia-aŭgusta numero transiris al 9-punktaj litertipoj por la ĉefaj artikoloj (antaŭe 10). La baza aspekto de la revuo tamen restis senŝanĝa.

Plej malkontentiga el teknika vidpunkto estis la fototekniko, kio ŝuldiĝas precipe al la manko de sperto pri tiu

kampo ĉe la redaktoro kaj grafikisto. Tiu mallerto bedaŭrinde atingis sian apogon en la Jubilea Numero, kie provo pri plibonigo (per ekuzo de pli fajna punktekrano) havis katastrofan efikon. (Plenkolora kovrilo prizorgita de la presejo almenaŭ savis la eksteran aspekton.) Ĉar la originaj fotoj, kiujn la redakcio perpoŝte ricevas, estas ofte jam subnormaj, estas des pli necese ke la revua teknikisto mastru la arton de fotopresado.

Enhava la revuo pergajnis pli da laŭdoj. Per disdono de ĉeftemoj al la diversaj numeroj kaj antaŭmendo de artikoloj, eblis teni sufiĉe altaj la nivelon kaj varion. Sinsekvaj numeroj ekde februaro pritraktis lingvoproblemojn, la Jubilean Jaron, instruadon, sciencan agadon, revuojn kaj radio-elsendojn, la centjariĝon de Esperanto, la 72an UK, la azian movadon kaj somerajn kongresojn, la solidarigan rolon de Esperanto, kaj esperantologion. Aparte ampleksa kaj pense riĉa estis la Jubilea Numero, kiu konsistis sole el artikoloj kaj poemoj, laŭpete verkitaj de reprezenta spektro da movadanoj. Plia kontribuo al la Jubileo estis la aperigo de la Estrara Raporto kiel aparta eldonaĵo, kio esence riĉigis la jarkolekton per la junia numero.

La diversaj rubrikoj aperadis en siaj tradiciaj formoj, kaj ekde junio aldoniĝis novstila "Reagoj"-paĝo, kiu rapide populariĝis kaj helpis altiri pli da legantara komento. Inter la ceteraj, "Laste aperis" nun ŝvelis ĝis amplekso iom ĝena el redakta vidpunkto: temas pri preskaŭ po unu paĝo ĉiunumere, eĉ post la adopto de pli kunpremita formato. "Loke-Fake-Persone" restas nemalhavebla rubriko por la kreskanta aktivado je "herbradika" nivelo; por limigi ĝian amplekson, la kriterioj devis esti plialtigataj. "Recenzoj" estis la rubriko, kiu pleje suferis pro la superabundo de aliaj temoj: nur dudek du libroj ricevis plenan pritrakton. La TEJO-rubriko, kiu dormis ĝis septembro pro malinteresiĝo flanke de TEJO, revekigis en oktobro sub la redakto de Didi Weidmann kaj poste endormiĝis ree. Georges Larglantier plu prizorgis, tre fidele, la radio-rubrikon.

La redakta emfazo pri diversopinieco kaj neoficialeco rezultigis nekutime grandan nombron da kontribuantoj al la jarkolekto: pli ol 120, ne enkalkulante la sendintojn de movadaj novaĵoj ks. Laŭ la leteroj ricevataj, precipe tiu aspekto plaĉis al la legantoj. Ankaŭ rekorda estis la enspezo pro anoncoj: pli ol 18 000 gld. Tio ŝuldiĝas parte al la specifa varbado de anoncoj por la Jubilea Numero, sed ŝajne ankaŭ al pli ĝenerala konsciiĝo pri la utileco reklami siajn aranĝojn kaj varojn en la plej legata movada revuo. La nombro de abonantoj kreskis ĝis 6520, de 6247 en 1986; ĉefe kreskis la kategorio de membroj-abonantoj, sed simplaj kaj kolektivaj abonoj ankaŭ iom plimultiĝis. La ciferoj tamen ne reatingis la nivelon de jaro 1980, kiam (pro ekstra kolektiva abono) la revuo havis 7848 abonantojn.

2. Kontakto: Leif Gunnar Nordenstorm en Svedio denove redaktis la tutan jarkolekton, kiu konsistas el ses numeroj kun po 16 paĝoj, inkluzive de la kovrilaj. Grafika Centro Antverpeno produktis ĝin, ekde kompostado ĝis ekspedo; tie Guido Bayens kaj Hugo Fontyn prizorgis la teknikan redakton kaj enkondukajn tekstojn. Estis dum la jaro kelkaj grafikaj ŝanĝetoj, sed restis la baza formato kaj la prezento de tekstoj laŭ kvar kategorioj de facileco. Frue en la jaro oni decidis provi numerojn sen ĉef-

temo, kaj jarfine aldoniĝis novaj rubrikoj pri literaturo kaj pri aspektoj de la Movado. Teme la numeroj pritraktis ekzemple vojaĝojn kaj Sudamerikon, kaj estis artikoloj pri lingvoj kaj instruado, pri scienco kaj religio, kaj pri kulturo en multaj landoj. En la kvara numero aperis la rezultoj de enketo ĉe la legantoj. Tio montris, ke duono el la respondemaj legantoj estas pli ol 30-jaraj. Ĉar la revuo celas gejunulojn ĝis-26-jarajn kaj ankaŭ komencantojn inkluzive de plenkreskintoj, ĝi iel devas servi al lingve sperta 16-jarulo kaj novica 60-jarulo: vera defio al la redaktoro.

Kolektivaj abonoj falis iom draste, pro reduktado de subvencio el Fondaĵo Azio-Afriko. La MJ-K kaj MA-K membroj kune altiĝis de 326 al 336, kaj simplaj abonoj de 389 al 400, sed refalis tiuj pro patroneco de TEJO de 72 al 59. TEJO esprimis sian intereson pri la estonteco de *Kontakt*, kiu bezonas atingi pli vastan legantaron por ke la rilato inter la kostoj kaj la nombro de legantoj estu taŭge rendimenta.

3. Esperanto-dokumentoj: Por malŝarĝi d-ron Tonkin, kiu dum multaj jaroj gvidis la redaktadon de tiu serio, Diccon Masterman transprenis la postenon de redaktoro. Ankaŭ Hervé Gonin, al kiu ni ŝuldas la tradukon kaj provlegadon de la plimulto de la ĝis nun aperintaj dokumentoj en la franclingva serio, retiriĝis de tiu tasko, kiun transprenis prof. Jean-Paul Beau. Aperis dum la jaro nur unu anglalingva kaj du franclingvaj dokumentoj, sed laboro pri pluraj aliaj progresis, tiel ke ili aperis frue en 1988. Kvankam *Esperanto-dokumentoj* ludas gravan kaj ĉiam pli grandan rolon en la informa laboro, tio ankoraŭ ne reflektiĝas ĉe la ekonomia flanko de la serio: Landaj asocioj kaj lokaj kluboj ofte atendas, ke UEA senpage disponigu la dokumentojn anstataŭ aboni ilin kaj en specifaj kazoj antaŭmendi la deziratan kvanton por siaj bezonoj.

7. KONGRESOJ

1. La 72a Universala Kongreso de Esperanto: La Kongreso okazis en Varsovio, Pollando, de la 25a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 kun 5 946 aliĝintoj el 73 landoj. Per tiu rekorda grandeco ĝi digne markis la centjariĝon de Esperanto en ties naskiĝurbo. La kongresa temo estis "Esperanto — 100 jaroj de internacia kulturo".

La Alta Protektanto de la UK estis s-ro Roman Malinowski, prezidanto de la pola parlamento. Lin subtenis en la Honora Komitato kvardeko da polaj eminentuloj. S-ro Malinowski elstaris ne nur pro sia aktivega engaĝiĝo en la preparlaboro de la UK kaj en la kongresa programo, sed ankaŭ pro sia iniciato de la estonta Bjalistoka Centro.

La grandecon de la UK emfazis la bezono dividi la Solenan Inaŭguron kaj la Internacian kaj Nacian Artajn Vesperojn en du sesiojn pro manko de salonego, kiu kapablis enteni 6000 ĉeestantojn. Eĉ pli ol en la pasinta jaro en Pekino, tiel grandega UK postulis multe pli da spertaj organizaj fortoj ol LKK aŭ UEA kapablis havigi: La kreiĝo de la definitiva LKK okazis tro malfrue pro la organiza krizo en Pola E-Asocio, kaj al UEA mankis Konstanta Kongresa Sekretario. Tio metis des pli grandan premon al la Centra Oficejo, kiu plenumis ne nur la enorman administran laboron, sed ankaŭ grave kontribuis al la organizaj preparoj. Estas apenaŭ surprize, ke kelkaj aspektoj de la

preparlaboroj estis tute ne adekvataj; aliflanke, oni devas miri pri la alta nivelo de la Kongreso ĝenerale. La Kongresa Libro kaj ĝia suplemento por la programo ampleksis pli ol 300 paĝojn.

Inter la plej bonaj partoj de la programo elstaris la artaj aranĝoj, ne nur pro sia kvalito sed ankaŭ pro la kvanto, kiu konsistigis plian rekordon en la kadro de rekorda UK. Restas apenaŭ kredeble, ke la organizantoj de la arta programo, sub la gvido de Ewa Siurawska, sukcesis enprogramigi kvindek da malsamaj artaj prezentaĵoj, el kiuj multaj estis ripetitaj eĉ plurfoje! La kvalito elokvente emfazis la signifon kaj gravecon de la kongresa temo. Kvino da ekspozicioj komplementis la densan artan programon, dum impona kaj vastega libroservo montriĝis nesufiĉa por tiom da klientoj.

Ne nur la urbo de la UK revekis la spiriton de Zamenhof, sed ankaŭ la ĉeesto de pluraj parencoj kaj membroj de lia familio, el kiuj lia nepo, d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, plurfoje lerte kaj kortuŝe parolis. Plia tre bona veno gasto de la UK estis s-ro Nigel Cassar, kiu ĉeestis la tutan semajnon kiel reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de UN.

Plian rekordon estigis la kvardeka sesio de la Internacia Kongresa Universitato, en kiu 20 prelegantoj faris 23 prelegojn sub la rektoreco de prof. J. Régulo Pérez. Grandan sukceson havis la 10a Esperantologia Konferenco kaj la 6a Tago de la Lernejo. La tria Tago de la Paco estis programo (kvankam ne ĉeeste) pli ampleksa ol en la antaŭaj jaroj kaj inkluzivis filmprezentadon, tridekon da mallongaj referaĵoj kaj la unuafojan prezenton de la Premio Onisaburo Deguĉi, donacita de Esperanta Propaganda Asocio de Oomoto. La gajninto de la premio, Hans Bakker, interalie sukcesis venigi dekkvinon da afrikaj esperantistoj el deko da landoj al la jubilea UK.

Oni invitis kelkcenton da kongresanoj al akcepto en la Parlamentejo kaj, kiel en antaŭaj jaroj, la sama malavara Oomoto gastigis la Komitaton de UEA per bankedo, dum kiu oni anoncis d-ron Detlev Blanke plej aktiva komitatano dum la pasinta jaro. Bankedon por la Komitato aranĝis ankaŭ Bahaa E-Ligo. La bankedoj parte rekompencis pro la multaj horoj da laboro, kiujn pasigis la Komitato dum la semajno. Tiom da horoj ne sufiĉis, tamen, kaj la fina sesio devis esti tro haste ĉesigita tuj antaŭ la Fermo.

La jubilea UK daŭrigis la kutimon okazigi multan turismon por kongresanoj, ĉu per la oficialaj dum- kaj postkongresaj ekskursoj, ĉu per antaŭkongresa turismo organizita de aliaj instancoj kun la subteno de la UK. Dum la tuttagaj ekskursoj pli ol mil kongresanoj vojaĝis al Bjalistoko por omaĝi la naskiĝurbon de Zamenhof kaj aŭdi la proklamon de la Deklaro de Bjalistoko.

Dum la UK fondiĝis Terminologia Centro de UEA post zorga periodo de kovado. Funkciis denove kaj Cseh-kursoj por komencantoj kaj Cseh-seminario por gvidantoj. Kunsidis pli ol 40 fakaj instancoj, okazis kutimaj laborkunsidoj, estis renkontiĝoj de la stabo de la CO kun la perantoj de UEA kaj kun la legantoj de la revuo *Esperanto*. La Kongresa Kuriero aperis ĉiutage en 6 000 ekzempleroj, kiuj komplete forkonsumiĝis.

2. Spezoj: Ne eblas en la momento de kompilado de ĉi tiu raporto anonci la definitivajn financajn rezultojn de la UK; supozeble ankaŭ ĝi estos same bona, i.a. pro la altega nombro da aliĝoj.

3. Infana Kongreseto: 30 infanoj ĉeestis la kongreseton, kiu pruviĝis esti unu el la plej malkontentigaj aspektoj de la UK kiel tuto; la kialo estas ĉefe atribuebla al la problemoj menciitaj en para. 1. Mankis diverseco de devenlandoj, la kongresejo estis maltaŭga kaj malbone preparita, kaj la organizado estis lastminute improvizita; la lingvonivelo de kaj infanoj kaj organizantoj estis plurkaze malakceptinda. Malgraŭ tio, la kongreseto estis filmita de pola televido.

4. La 43a Internacia Junulara Kongreso: La Kongreso de TEJO okazis en Krakovo, Pollando, de la 17a ĝis la 24a de julio 1987 kun preskaŭ 1 000 partoprenantoj — plia rekordo. (Vidu ĉapitron 11.7.)

5. Estontaj kongresoj: En 1989 la UK okazos en Braĵtono, Britujo. Ĝis la fino de 1987 ne estis definitiva decido pri postaj UK-oj, kvankam la Estraro aktive konsideris invitojn por la jaroj 1990 ĝis inkluzive 1993. Estis traktata nova Kongresa Regularo, kiu estos esenca ilo en la kreado de forta kontrakta bazo por la rilatoj inter LKK kaj UEA.

8. JUBILEA JARO, INFORMADO

1. Internacia informlaboro: Se interne la Jubileo estis kultura festo (ĉapitro 10), ekstere ĝi estis la okazo de la plej granda informa ondo en la historio de la Internacia Lingvo. En tiu ondo UEA ludis centran, kunordigan rolon: Krom la agado de la landaj kaj fakaj asocioj, la Centra Oficejo ofte rekomendis al ĵurnalistoj taŭgan informanton en nacia lingvo, provizis fotojn kaj aliajn materialojn, sendis pli precizajn kaj ĝisdatajn informojn al esperantistaj artikolantoj tra la mondo, dum la estraranoj, komitatanoj kaj delegitoj multloke enplektiĝis en la informa laboro. Tre ofte tiu agado portis senprecedence bonajn rezultojn.

Verŝajne la plej vaste legata artikolo de la jaro aperis en la fama usona-internacia magazino *Time*, kiu havas ĉ. 35 milionojn da legantoj: Duonpaĝa anglalingva teksto aperis paralele kun Esperanta traduko. La enhavo estis atendeble iom supraĵa, tamen en sia dulingva formo montris ĝenerale pozitivan sintenon. Pli detala artikolo aperis en la monde legata ĵurnalo *International Herald Tribune* (Parizo); la raportisto intervjuis plurajn eminentajn movadanojn surbaze de rekomendoj flanke de UEA. Alian bonan artikolon, en la usona *U.S. News & World Report*, transprenis pluraj gazetoj en aliaj lingvoj: Ni scias almenaŭ pri itala, korea kaj rusa tradukoj.

La 72a Universala Kongreso altiris 145 ĵurnalistojn, inkluzive de la mondaj novaĵagentejoj; la polaj novaĵagentejoj, radio kaj televido ne nur raportis enlande, sed transdonis ampleksajn materialojn al siaj alilandaj kolegoj. Tute nova estis la tutsemajna ĉeesto de usona kaj hungara televidaj skipoj, apud la pola.

Aperis jubileaj poŝtmarkoj en sep landoj: Pollando, Germana DR, Bulgario, Malto, Ĉinio, Kubo, precipe pro la streboj de la landaj movadoj, kaj Surinamo, dank' al la rekta instigo de UEA. Krome aperis koverto en Sovetunio, oficialaj poŝtkartoj en Hungario kaj Koreio, pluraj unuataĝaj kovertoj en Ĉinio kaj poŝtstampoj en multaj landoj.

Landaj informlaboroj: En tiu ĉi ĉapitro ni prezentas tre mallongan resumon de kelkaj ĉefaj eroj de la jubilea informa agado tra la mondo, surbaze de enketo inter la landaj asocioj kaj unuopaj aktivuloj. Ĝi neniel pretendas esti kompleta, ĉar por tio mankas spaco kaj ĉi-momente ankaŭ

informoj el pluraj gravaj landoj. Pli ampleksa — kaj ilustrita — superrigardo estos trovebla kiel unu ero en la Jubilea Libro, kiun eldonos UEA antaŭ la 73a UK en Roterdamo.

Aŭstralio: Subteno de pintaj Unesko-funkciuloj k.a. eminentuloj, ekspozicio en la Nacia Biblioteko. **Aŭstrio:** 40 artikoloj, ĉiuj fremdlingvaj programoj de la kurtonda radio, du internaciaj konferencoj, monumento, poŝtstampo. **Belgio:** ĉ. 300 artikoloj, pluraj radio- kaj televidprogramoj, ĉefministro k.a. eminentuloj en patronkomitato. **Brazilo:** Pli ol 40 grandaj artikoloj, atentokapta landa kongreso kaj urbokonsilia solenaĵo en Rio de Janeiro. **Britio:** 27 tutlandaj artikoloj, Monda Servo de BBC, sep televidaj elsendoj, kulturfesto en Londono, busreklamoj, ekspozicio en mondfama biblioteko, roznomo, vinmarko.

Nun haveblas ĉe la Libroservo de UEA:

Esperanto

la inspira dokumenta filmo
farita sur kvar kontinentoj
de pola reĝisoro Roman Dobrzyński.

Vidu facetojn de la Movado, kiujn vi neniam povis sperti: orfoj en Brazilo, oomotanoj en Japanio, ĥoroj en Bulgario, lernejoj en Kubo. **La magio de Esperanto** — sur filmo.

Vidbendo VHS NV-E180SP. Proksimuma daŭro: unu horo. Prezo: 75,00 gld. plus sendokostoj.

Bulgario: Amaso da artikoloj, televidaj filmoj kaj intervjuoj, publikaj kulturaj aranĝoj. **Ĉinio:** Pluraj grandaj ekspozicioj, informlibro, televidaj filmoj kaj kursoj, publika subteno de landaj kaj lokaj funkciuloj. **Finnlando:** Pli ol 100 artikoloj, informkajero por ĵurnalistoj, publika apogo de eksa asista ĝenerala sekretario de UN. **Francio:** Tuthora radio-elsendo ĉe France-Inter, unu-du horoj semajne ĉe pluraj lokaj stacioj, Zamenhof-medalo ĉe nacia monfabriko. **Hispanio:** Apogo de la hispana reĝo, multaj artikoloj, aŭspicio de Unesko-komisiono por poezi-antologio, du informlibroj, biografio de Zamenhof en la kataluna. **Irano:** Grandaj artikoloj en tutlandaj revuoj, elstara loko de Esperanto en ŝtata eldono de la poeto Kajamo. **Islando:** Grandaj ĵurnalartikoloj, televidaj intervjuoj, gazet-formata informilo. **Israelo:** 5 grandaj artikoloj (unu malfavora), informlibreto kaj vortaro, granda ekspozicio en Jerusalemo, informvespero en Telavivo sub urba aŭspicio. **Japanio:** Publika simpozio pri internacie uzataj lingvoj, informlibroj, multa gazetara atento (ni ne havas superrigardon). **Jugoslavio:** Ducento da artikoloj, simila nombro da radio-elsendoj, ĉ. 15 televid-elsendoj inkluzive de populara 90-minuta kvizprogramo, kulturfesto kaj PIF en Zagrebo. **Koreio:** Granda ekspozicio en Seulo, Esperanto kiel laborlingvo ĉe la nacia turisma organizaĵo, jubilea poŝtkarto. **Kubo:** Artikoloj en la plej gravaj gazetoj, multe da atento ĉe la novaĵagentejoj kaj radio, 1-a Kuba Esperanto-Kongreso, jubileaj aranĝoj en lernejoj. **Madagaskaro:** Ses artikoloj, tri radio-elsendoj, unu televid-elsendo. **Meksikio:** Tuthora elsendo ĉe la radiostacio de la Edukministerio, du tutlandaj televid-elsendoj, Zamenhof-tagito kunlabore kun pola

ambasado kun subteno de la gvidantoj de la Unesko-komisiono kaj la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj. *Mongolio*: Dupaĝa artikolo en *Mongolia*, laŭ kiu kelkmilo da homoj membras en la landa movado. *Nederlando*: Ampleksaj artikoloj en ĉiuj ĉefaj ĵurnaloj kaj revuoj, informlibroj, atento al DLT. *Nepalo*: Pluraj artikoloj, traduko de *Kumeŭaŭa*, mencio en la parlamento. *Norvegio*: 250 artikoloj en 107 gazetoj, 37 radio-elsendoj, parlamenta prezidanto ĉe festkunveno en Oslo, informlibro, vidbendo, broŝuro sub aŭspicio de Unesko-komisiono. *Pakistano*: Pluraj artikoloj en la urdua, pangaba kaj angla, duonhora televida intervjuo, E-fako ĉe grava biblioteko, informiloj, Esperanta-urdua vortaro kaj lernolibro ĉe nacia lingva instituto. *Pollando*: Plurcento da artikoloj, radio-elsendoj kaj televidaj novaĵoj, aparte pri la UK, informlibro, publikaj kulturaj aranĝoj. *Sovetunio*: Grandaj artikoloj kaj informlibroj en Estonio kaj Litovio, libroekspozicio en Moskvo, interlingvistika simpozio en Tartu, ekologiaj ekspedicioj, artikoloj en kelkaj tutlandaj revuoj, oficiala koverto (la unua sovetia E-filatelaĵo post 1927), vigla publika agado en pluraj regionoj. *Svedio*: 350-400 artikoloj, pli ol 150 radio-elsendoj, subteno i.a. de la kulturministro kaj la prezidanto de la UN-asocio, informlibreto, eldonaĵoj ĉe la parlamento kaj la Sveda Instituto. *Venezuelo*: Kvindek da artikoloj, sep radio-elsendoj, du tutlandaj televid-elsendoj, aŭtoparado en Karakaso. *Vjetnamio*: Apogo de Unesko-komisiono, vortaro kaj lernolibro; pliajn detalojn ni ne scias.

9. EKSTERAJ RILATOJ

1. Unuiĝintaj Nacioj: Ĝis maksimume oni ekspluatis la Jubileon de Esperanto en la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiu laboro ankoraŭ daŭras. La oficejeto de UEA trans la strato de la ĉefsidejo de UN estis gvidata de teamo konsistanta el d-ro Humphrey Tonkin, d-ro Julius Manson kaj s-inoj Rochelle Grossman, Elizabeth Manson kaj Sharon Bourke. Gvidis kursojn s-ro Leonard Dzelzitis. UEA estis daŭre reprezentata en kunsidoj de UN kaj komitatoj de nerigistaraj organizaĵoj (inkluzive tiun pri la Universitato por Paco, en Kostariko), kaj okazis kontaktoj kun diversaj naciaj misioj de UN. Unu el la ĉefaj celoj de la Jubileo estis informi ĉiun anon de la Sekretariato de UN en Novjorko pri Esperanto per persona sendaĵo. Temas pri kelkaj miloj da homoj, kaj tiu laboro ankoraŭ daŭras en 1988. Ĝi estas la plej granda kampanjo ĝis nun farita de la laborgrupo de UEA pri UN.

Dum la Jubilea Jaro la novaĵletero de la Novjorka Oficejo aperis ĉiumonate en la angla kaj Esperanto. Ĝin ricevis ĉiuj misioj kaj ĉefaj funkciistoj de UN kaj esperantistaj subtenantoj de la oficejo. Aperis ankaŭ la informilo *UN kaj ni* sub lerta redakto de s-ino Akiko Uusink-Nagata, kaj kunlaboris kolegoj en Vieno kaj Ĝenevo, precipe d-ro Hans Michael Maitzen. La bonaj rilatoj inter UEA kaj la Traduka Fako de UN rezultigis du konferencojn de CED dum la jaro: pri “Lingvo en religio” en majo kaj “Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj” en decembro (vidu ĉapitron 14 de tiu ĉi jarraporto).

Ĉi-jare, por la unua fojo, la Ĝenerala Sekretario de UN estis reprezentata tra la tuta semajno de la Universala Kongreso en Varsovio: s-ro Nigel Cassar, estro de la Terminologia Sekcio de UN, salutis en la Inaŭguro kaj

partoprenis plurajn kunsidojn dum la semajno, interalie pri kunlaboro en la terminologia agado de UEA. La kontaktoj daŭras.

La 11-an de decembro, UEA organizis sian kutiman akcepton okaze de la Zamenhof-Tago kaj prezentis en speciala ceremonio dum la festo la trian Premion Zamenhof, ĉi-foje al s-ro James Grant, asista ĝenerala sekretario de UN kaj direktoro de la Infan-Fonduso de UN (UNICEF). La premion, kiun oni aljuĝas ĉiujare al internacia figuro kiu aparte antaŭenigis la internacian kompreniĝon, ricevis en antaŭaj jaroj s-ro Robert Muller (UN) kaj s-ro Amadou-Mahtar M'Bow (Unesko). S-ro Muller ĉeestis la ĉi-jaran ceremonion kaj aparte salutis s-ron Grant. Deklaris s-ro Grant: “Esperanto kaj UNICEF havas saman signifon: espero.”

La laboron en Novjorko ebligas libervolaj donacoj de membroj de UEA. Oni povas fariĝi subtenanto de la tiea agado per aliĝo al la “Amikoj de la Novjorka Oficejo” (vidu la Jarlibron 1988, p. 34).

2. Unesko: Sekretariato kaj la ne-registaraj organizaĵoj (NRO): Aldoniĝis al la pariza laborgrupo (E. Chicot, P. Guerout, B. Despiney) du novaj kunlaborantoj, Aline Boulet kaj Daniel Doye, kies ĉeftasko estas reprezenti TEJO-n ĉe diversaj konferencoj kaj kunsidoj.

Ne okazis io speciale grava dum la Jubilea Jaro, krom rutina partopreno en ekzemple laborgrupoj pri homrajtoj, virinoj, junularo ks. Rilate la Jardekon de Kultura Evoluo (1988-1997), E. Chicot parolis ĉe pariza kolokvo en decembro. Okazis diskuto kun polaj instancoj pri la demando, ĉu proponi al la Ĝenerala Konferenco de 1987 novan rezolucion, ĉi-foje pri la Bjalistoka Centro, sed oni sentis la grundon ne sufiĉe preparita por tia iniciato; la propono estas konsiderata por la venonta Konferenco, post du jaroj.

TEJO reprezentigis en Madrido fine de septembro en konsultiĝo de junularaj NRO-j (G. Kamaĉo). UEA/TEJO kandidatiĝis al la laborgrupo de tiu grupo de NRO-j, sed ne akceptiĝis.

Nur la kontaktoj kun Monda Pac-Konsilio alportis pli da fruktoj dum 1987. Tiu ĉi influhava (kvankam politike neneŭtrala) NRO, kiu havas konsultajn rilatojn en Kategorio A kun Unesko kaj membras en la Komitato de NRO-j ĉe UN, okazigis kun UEA komunan seminarion (aŭ kolokvon) fine de oktobro en Helsinki, kie situas ĝia sidejo. Raporto pri la aranĝo aperis en la decembra numero de la revuo *Esperanto*, kaj ĉerpaĵoj el kelkaj referaĵoj eniris la januaran numeron 1988. Ĉeestis la prezidantoj de ambaŭ organizaĵoj, d-ro Humphrey Tonkin flanke de UEA kaj s-ro Romesh Chandra flanke de MPK, plus membroj de iliaj estraroj kaj profesiaj staboj kaj dekkvino da esperantistoj el la najbaraj landoj.

Fine de la kolokvo oni interkonsentis pri limigita programo de kunlaboro inter la du organizaĵoj, kiu antaŭvidas i.a. reciprokan ĉeeston de kongresoj kaj konferencoj, eldonon de pactemaj verkoj en Esperanto kaj kunlaboron pri aferoj de komuna intereso ĉe UN kaj Unesko. Estas substrekinde, ke tiu interkonsento ne implikas apogon flanke de UEA por la politikaj opinioj de MPK, kiu siavice indikis tre klare ke ĝi ne atendas tian apogon kaj respektas la neŭtralecon de la Asocio.

Unu rezulto de la interkonsento venis ankoraŭ dum 1987, kiam d-ino B. Despiney estis invitita ĉeesti decem-

bran informkunvenon Unesko-MPK pri la Jardeko de Kultura Evoluo kiel tiukampa eksperto.

Landaj Unesko-komisionoj: Eksploatado de la sofia rezolucio pri Esperanto je ĉi tiu flanko dependis grandparte de la iniciatemo de la Landaj Asocioj. Ĝojigas, ke almenaŭ ses LA sukcesis gajni aŭspicion por iu jubilea projekto: jubilea flugfolio en Norvegio pri la agado de UEA; Internacia Foir Esperantista Renkontiĝo (IFER) en Leipzig, GDR (kie prezidiano de la landa Unesko-komisiono, d-ro Helmut Tautz, mem parolis en Esperanto); la viena simpozio "Esperanto 100-jara"; la festivalo "100 jaroj de E-kulturo" en Zagrebo; kaj hispana antologio de poemoj, *Sentempa simfonio*, en traduko de Fernando de Diego. Tamen estas verŝajne, ke pli da rezultoj sur tiu kampo estus eblaj per pli kunordigita kaj celkonscia agado; kredeble, multaj LA simple ne proponis ian projekton al sia nacia komisiono, malgraŭ bonega preparo de la tereno per la sofia rezolucio kaj persona letero al la komisionoj flanke de la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou Mahtar M'Bow. Tiaj ŝancoj ne venas tiel ofte, ke ni rajtas kontenti pri la ĉi-supra rikolto.

3. Aliaj interŝtataj organizaĵoj: La agado je eŭropa nivelo stagnis dum 1987. Anne Tilmont devis rezigni pri la gvidado de la Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo, kun la rezulto ke preskaŭ tute mankis internacia kunordigo de diversaj provoj vekis intereson pri la Jubileo ĉe eŭropaj instancoj. Ankaŭ la komisiitoj de UEA pri eŭropa agado (B. Despiney, G. Maertens, E. Ludwig) konstatis la bezonon de pliaj homfortoj en la rilatoj kun ekzemple la komitato de eŭropaj NRO-j. Sen pli da aktivuloj, la agado de UEA sur tiu kampo minacas resti esence pasiva: laŭnoma partopreno sen vera engaĝiĝo.

La agado de kelkaj landaj asocioj en Eŭropo meritas atenton. Nederlanda E-Asocio dissendis ekzempleron de la informlibro *Esperanto honderd jaar* (G.F. Makkink) al la nederlandaj naciaj kaj eŭropaj parlamentanoj. Andrea Chiti-Batelli, dum pli ol dudek jaroj itala funkciulo ĉe la Eŭropa Asembleo, publikigis franclingvan libron *Communication internationale et avenir des langues et des parlers en Europe* (Internacia komunikado kaj estonteco de lingvoj kaj idiomoj en Eŭropo; Presses d'Europe, 1987), en kiu li argumentas por la ĝenerala instruado de Esperanto kiel estonta eŭropa liglingvo. Ankaŭ lia itala libro *La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica* (La internacia komunikado en politiko kaj lingvoinstruado; Marzorati Milano, 1987) forte pledas por Esperanto.

10. KULTURO KAJ EDUKADO

1. Kulturo: Kvazaŭ interkonsente, la Jubilea Jaro celebrigis kiel la Jaro de la Esperanta Kulturo en multaj agadoj kaj aranĝoj tra la mondo. Tio okazis plejparte nature, senplane. Se el tio oni tirus konkludon, ĝi eble rilatus al la kresko de memfido kaj memfiero ene de la esperantista diasporo; aŭ eble al tio, ke la realeco de nia kulturo estas daŭre malfacile komunikebla al eksteruloj, ankoraŭ temo por manifestacioj.

La plej grava kontribuo flanke de UEA al tiu kultura festo estis sendube la Universala Kongreso en Varsovio. Sole la renkontiĝo de ses mil homoj el pli ol sepdek landoj sufiĉus por pravigi tiun aserton. Sed ankaŭ la arta programo de la UK tre sukcesis, kaj necesis okazigi multajn pro-

gramerojn du- aŭ tri-foje pro la amasa ceestantaro. La Nacia Vespero estis brila, la Internacia bedaurinde iom pala, sed aliflanke la abunda programo de Esperanta teatro — fare de la trupoj Bulgarà Esperanto-Teatro, Teatr Powszechny, Verda Monto kaj Krizalido kaj de la profesiaj unuopuloj Mirosław Henke, Jerzy Fornal, Ursula Tupejka, Vida Jerman kaj Jadwiga Gibczyńska — vere imponis. Aparte menciindas la muzika programo, en kiu elstaris la kanada kantistino Joëlle Rabu (kies parte Esperanta disko/kasedo *Passport* cetere bone ekvendiĝis) kaj la popularaj skandinaviaj rokgrupoj Amplifiki kaj Persone.

1987 estis grava jaro rilate la Esperantan filmarton: En Varsovio debutis originala dokumenta filmo de la pola televid-regisoro Roman Dobrzyński, *Esperanto*, kaj profesia dublajo de la hungara postmilita klasikaĵo *En Euro-po ie*. Tiu lasta, de la ne-esperantista sonreĝisoro István Vajda, estas eventuale nur la unua ero en serio de klasikaj filmoj, tradukotaj el diversaj lingvoj en Esperanton. La filmo de Dobrzyński cetere meritas subtitolojn por publika uzo; svedlingva traduko jam aperis.

Alia granda festo, "Cent jaroj de Esperanto-kulturo", okazis en Zagrebo en aŭgusto, sub la aŭspicio i.a de UEA sed organizite precipe de Kroatia Esperanto-Ligo kaj Internacia Kultura Servo. La partoprenantaro, c. 300 homoj, iom subis la esperojn: Versajne la tuj-antaua UK havis negativan efikon, kiel eventuale aliaj jubileaj aranĝoj en jaro fakte troŝtopita. En la 20a Pupteatra Internacia Festivalo, kiu kernis la programon, gajnis la Esperantan premion la franca aktoro André Morel per sia prezento de *Kandido*, laŭ ĉiuj raportoj lingve kaj arte brila. Lingve elstaris ankaŭ Leningrada Esperanto-Teatro per adaptoj de Ŝekspiro kaj Dostojevsko.

En marto okazis la 5a Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, en Budapeŝto samtempe kun la Hungara Jubilea Kongreso. Londono kaj Parizo gastigis kulturajn festivalojn en julio kaj novembro respektive, dum pli-malpli ĉiuj naciaj kaj internaciaj-fakaj kongresoj zorgis pri kultura programo en Esperanto, foje tre altkvalita. Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando, kaj la Internacia Esperanto-Lernejo en Pisaniĉa, Bulgario, ofertis diversajn kulture valorajn kursojn kaj seminariojn tra la jaro.

Ankaŭ la eldonado tre viglis dum la Jubilea Jaro. Estas ankoraŭ tro frue por fari finkalkulon, sed la registraĵoj en la Biblioteko Hodler preskaŭ certe rompos la antaŭan rekordon de 304 libroj en 1982 (oni antaŭvidas ciferon super 320). Enkadre de tio alia rekordo forviŝiĝis dramece: Aperis almenaŭ sep originalaj romanoj, kvankam du el ili ne enmerkatiĝis antaŭ 1988. Pli precize, temas pri du libroj de István Nemere (*Serĉu mian sonĝon, Terra*), *Adolesko* de Blazio Vaha kaj la mallonga *Adiaŭ, Kuzko!* de Oldrich Kníchal (tiel ke Hungario respondecas pri duono de la rikolto!), *Kazinski venas tro malfrue* de Deck Dorval (Belgio), *Klaĉejo* de Karolo Piĉ (Ĉeĥoslovakio) kaj *Karuseloj* de brazilanino Sara Larbar.

Aperis ankaŭ pluraj originalaj poemaroj kaj novelaroj, interalie de Pióro, Berveling, Silber, Modest, kaj la originalaj antologioj *Rozo kaj glavo* (bulgara) kaj *Sub signo de socia muzo* (internacia). Kiel gravaj represaĵoj menciindas *Kiel akvo de l' rivero* (1963) kaj *Vole... novele* (1971) ĉe Iltis, *Sur kampo granita* kaj *La blinda birdo* (ambaŭ 1983)

ĉe Hungara E-Asocio, *Beletro sed ne el katedro* (ampleksigita eldono de *Eseoj 1: Beletro* (1956) de Waringhien) ĉe Flandra E-Ligo kaj kompleta kolekto de la poemoj de Auld, *En barko senpilota*, ĉe Edistudio.

Inter amaseto de tradukoj aperis almenaŭ kvar naciaj antologi(et)oj: hebrea, hispana kaj nederlanda (poezio) kaj korea (noveloj kaj eseoj). (Tri pli ampleksaj, la aŭstralia, itala kaj la dua angla, sukcesis finpretiĝi nur post la jarfino.) Eldoniĝis notindaj romanoj, dramoj k.s. el pluraj lingvoj; 30-lingva irana eldono de la Robaioj de Kajamo donis honoran lokon al la Esperanta traduko de Waringhien. En FR Germanio aperis ĉe la renoma eldonejo Rowohlt germanlingva biografi-romano pri esperantisto, *Der Klang der Fanfare* de Johano Strasser, kiu rikoltis laŭdojn en literaturaj rondoj.

La plej aktivaj Esperanto-eldonejoj en la Jubilea Jaro estis Hungara E-Asocio (19 libroj en entute 53 000 ekz., plus 4 nacilingvaj verkoj), la brazila Fonto (12) kaj Ĉina E-Eldonejo (9, plus 4 infanaj bildlibroj kaj 12 poŝtkart-serioj).

Aperis revuo pri la Esperanta gazetaro en *Esperanto* 1987/p.104-106. En 1987 ekis kelkaj novaj internaciaj periodaĵoj, el kiuj *Latinamerika memuar*o havas precipe kulturan emfazon, dum la usona bulteno *Infanoj ĉirkaŭ la mondo* ekdividas la infanan kampon kun la reviviĝinta *Juna amiko*.

La internaciajn radioprogramojn oni simile revuis en *Esperanto* (p.106-7). Inter ĉi tiuj valoregaj eroj de nia kulturo, apartan rolon dum la Jubilea Jaro ludis la elsendoj de Radio Polonia kaj Radio Pekino pro sia ofteco, profesieco kaj regula okupiĝo pri movadaj revuoj, renkontiĝoj, novaĵoj k.s. La pola skipo povis ĉiutage dum la 72a UK elsendi freŝan raporton al tutmonda aŭskultantaro, same kiel faris Pekino en 1986.

Ĉi tiu konciza superrigardo neeviteble malatentis multajn unuopajn erojn el la pasinta jaro. Kelkaj ricevis agnoskon aliloke en ĉi tiu raporto, aliaj mankas simple pro tio, ke ne plu eblas kompetenti pri ĉiuj facetoj de la kultura kreado pere de la Internacia Lingvo. Akceptu ĉi tiun ĉapitron, do, kiel impresan skizon de nia Kultura Jubileo, kolektivian dankon al la kreintoj kaj instigon al vi kontribui mem al la komuna kultivado.

2. Edukado: La rilatoj inter UEA kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) fariĝas ĉiam pli intensaj kaj utilaj. Pruvoj pri tio estas facile troveblaj ankaŭ en la agado dum 1987. ILEI prizorgis komplete la Tagon de la Lernejo dum la UK en Varsovio kaj ĝi altiris ĉ. 600 personojn. La temo de la aranĝo estis: "Humuro, ludo kaj dramo en la instruado". ILEI prizorgis ankaŭ la Internaciajn Ekzamenojn, kiujn en Varsovio faris dudeko da kandidatoj, ĉefe al Afriko. Unueca ekzamensistemo estis plue prilaborata, tiel ke ILEI diskutos ĝin dum sia 22a Konferenco en Kerkrade, Nederlando, de la 16a ĝis la 23a de julio 1988. Ĝenerale, ILEI daŭrigas sian internan reorganizon kaj spertas vastiĝon. La membronombro daŭre kreskas, kaj en 1987 kreiĝis du novaj landaj sekcioj: Zairio kaj Slovakio. Per financa helpo de la Eduka Fondaĵo Carson (Kanado) ILEI eldonis allogan informilon. Ĉiam pli oftaj estas kontaktoj kun la landaj asocioj de UEA. Antaŭe tiuj rilatoj preskaŭ ne ekzistis, dum ili nun estas intense flegataj kaj la kunlaboro fariĝas ĉiam pli sistema kaj utila

ambaŭflanke. Nun en la sino de ILEI ekzistas ankaŭ bazo por kunlaboro kun la Terminologia E-Centro de UEA.

La laboron de ILEI dum la pasinta jaro certe influis unue malsano kaj poste morto de prof. Szerdahelyi, unu el la plej elstaraj figuroj en la historio de la instruista Esperanto-movado. La redaktadon de *Internacia pedagogia revuo* transprenis lia studento kaj kunlaborinto István Ertl, dum du aliaj eksstudentoj liaj, Ilona Koutny kaj Zsuzsa Varga-Haszonits, sekvis lin kiel instruistoj ĉe la Esperanto-fako en Budapeŝto.

Kiel kutime, tre valoran subtenon al la instruista agado donis Koresponda Servo Mondskala (KSM), kiun jam de ses jaroj sukcese gvidas Robert Llorens, Nico (Francio). KSM dum 1987 havis rekorde grandan nombron de 913 alskribintoj el ĉ. 60 landoj. Kiel problemo restas la fakto, ke du trionoj de la anoj de KSM estas eŭropanoj (inter ili 72% estas orienteŭropanoj). Multe helpus, se la nombro de korespondemuloj kreskus en ne-eŭropaj landoj, sed ankaŭ en okcidenta Eŭropo, ĉar ĝuste de tiu mondoparto oni plej petas korespondantojn.

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

1. Komitato: La komitato de TEJO konsistas nun el 60 komitatanoj A, B kaj C, inter kiuj 19 inoj. Ĝi kunidis dum la IJK en Krakovo kaj krome okazis poŝtaj voĉdonoj en oktobro kaj januaro. Pluraj komitatanoj dum la jaro aktive laboris kiel komisiitoj por specialaj taskoj.

2. Estraro: La estraro dum la IJK komplete novelektiĝis. Prezidanto: Jan Koszmaluk; ĝenerala sekretario: Dietrich Weidmann; kasisto: Claude Rouget; aliaj estraranoj: Sándor Hideg kaj Rezső Baross. Krome kunlaboras en la estraro tri estraraj komisiitoj: Silvia Pilger, Gábor Déak Jahn kaj Dimitar Dimitrov. La estraro komplete kunsidis la 23an kaj 24an de januaro 1988 en Budapeŝto. Krome okazis kunsido ĉe la UK en Varsovio.

3. Periodaĵoj: *Kontakto* dum la tuta jaro sub la redaktado de Leif Nordenstorm regule aperis. Ĝi pli kaj pli transprenis la rolon de instrua revuo pri aktualaj temoj ekstermovadaj. *TEJO tutmonde* (TT) fariĝis la oficiala organo de TEJO kaj iel transprenis la rolon de forumo de la junaj esperantistoj en la mondo. Sub la redaktado de Andy Künzli ĝi iĝis respektinda revueto belaspekta, kiu regule kaj akurate aperadas.

4. Financoj: Eble la unuan fojon en la lastaj jaroj la kaso de TEJO estas en ordo. Nia nova kasisto sukcesis ordigi la haoson, kiun postlasis liaj antaŭuloj. Klariĝis nun pli-malpli ĉiuj malklaraĵoj, kaj ni finfine havas plenan superrigardon pri la rimedoj de TEJO.

Ni alvenis al la konkludo, ke TEJO ne havas deficiton, sed ankaŭ, ke mankas nun mono por agadoj kiuj kondukus al kresko de la membraro kaj de la aktivecoj. Se ni volas haltigi la konstantan malkreskon de la nombro de individuaj membroj, tiam ni devas tamen ion entrepreni.

Unuflanke tial la komitato de TEJO altigis la kotizojn por patronoj. Aliflanke la komitato alprenis rezolucion pri altigo de la aĝlimo por individuaj membroj de TEJO al 30. Tiun demandon devos trakti la komitato de UEA.

5. Faka agado kaj kulturo: Estas preparita kaj agnoskita kontrakto inter Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj TEJO. Interne de TEJO funkcias du fakaj

sekcioj, nome BEMI (biciklantoj) kaj KOKO (naturprotektantoj).

Okazis aŭtune en 1987 seminario en Bulgario kun la temo "Okcidento-Oriento interkomunikas", kiun BEJ tre sukcese aranĝis. En julio 1988 okazos en Szeged seminario de *Literatura foiro* kaj HEA pri "Esperanto en la dua jarcento" sub la aŭspicio de TEJO. Krome okazis en printempo 1988 en Pollando seminario de TEJO kaj PSEK pri edukado.

6. Eksteraj rilatoj: Jan Koszmaluk partoprenis kiel oficiala reprezentanto la kongreson de Internacia Unuiĝo de Studentoj en Kubo. El tio rezultis la invito de TEJO-delegitaro ĉi-januale al Prago, kaj komunaj deklaro kaj seminario pri la Nova Internacia Komunika Ordo (NIKO). Silvia Pilger kaj Bob Venhuizen reprezentis TEJO ĉe la eŭropaj junularaj organizaĵoj. TEJO post longa paŭzo reorganizos la famajn KER-seminariojn kun subvencioj de la Eŭropa Konsilantaro. Planitaj estas du tiaj seminaroj en 1989 en Grésillon kaj La Chaux-de-Fonds.

7. Kongresoj: La 43a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazis de la 17a ĝis la 23a de julio en Krakovo, Pollando, kaj estis kun 1044 kotizintaj (kaj ankoraŭ plurcent nealiĝintaj) kongresanoj la plej granda, impona kaj sukcesa kongreso en la preskaŭ 50-jara historio de TEJO. La venontaj junularaj kongresoj okazos en Zagrebo, Jugoslavio (1988) kaj en Nederlando (1989). Por la jaro 1990 jam alvenis du invitoj, nome el Kubo kaj Svislando. Estas starigita konstanta komisiono pri kongresoj sub la gvido de la estrara komisiito Silvia Pilger.

8. Landa agado: TEJO dum la IJK akceptis unuanime katalunan sekcion. Tiu decido tamen estis poste nuligita de la estraro, ĉar la statuto de KEJ ne kongruis kun la regularo de TEJO. Nova aliĝpeto el Katalunio estas atendata. Intertempe en la januara poŝta voĉdono la komitato de TEJO akceptis la aliĝpeton de la dana junulara sekcio. Alvenis aŭ estis anoncitaj aliĝpetoj el Zairio kaj Kubo.

La ĝenerala sekretario prezentis novan koncepton pri landa agado (en kombino kun eksteraj rilatoj). Temas pri tio, ke TEJO-anoj, kiuj aktivis en internaciaj organizaĵoj je nacia nivelo, informu pri sia agado la ĝeneralan sekretario de TEJO. Tiu poste por ĉiu organizaĵo nomas kunordiganton, kiu siavice havas la taskon aranĝi, ke ekzemple en internaciaj konferencoj de tiuj organizaĵoj partoprenos esperantistoj el pluraj landoj, ke interne de ili iom post iom povos fondiĝi fakaj sekcioj esperantistaj, kaj ke esperantistoj havos ŝancon transpreni gvidajn postenojn en tiaj organizaĵoj.

12. LANDA KAJ REGIONA AGADO

1. Aliĝintaj landaj asocioj: Ne ŝanĝiĝis la nombro de la aliĝintaj landaj asocioj (44), kvankam pretiĝas tri proponoj, ĉiuj el Afriko. Ankaŭ la vivon de la landaj organizaĵoj dum 1987 stampis unuavice la jubileaj agadoj, kiuj ofte estis abundaj kaj plurfoje ankaŭ tre sukcesaj. Preskaŭ ĉie temis pri aparte sukcesaj landaj kongresoj, kiuj ĉifoje ricevis multe pli vastan atenton de la amaskomunikiloj ol iam ajn antaŭe. Tiel estis en Aŭstralio (en ĉeesto de la UEA-vicprezidanto Umeda), en Svedio (la kongreson en la sveda parlamentejo ĉeestis la prezidanto Tonkin kaj d-ro J.C. Wells), en Kubo (gastoj: estrarano O. Haszpra,

D. Blanke, S. Milojević), en Finnlando (ĉeestis la vicprezidanto Maertens), en Hungario (malfermo de la kongreso okazis en la parlamentejo; ĉeestis i.a. la ĝenerala sekretario F. Szabó-Felső), en Hispanio (gastoj: W. Auld, S. Milojević), en Oslo (en ĉeesto de la prezidanto de la Norvega Parlamento kaj gastparolanto C. Piron), Korea Respubliko (ĉeestis Umeda) ktp. Ĝenerale eblas aserti, ke la landaj asocioj aktivis dum 1987 pli intense kaj pli celkonscie ol dum multaj aliaj lastatempaj jaroj. Ni esperu, ke ili akceptos la inviton de la Estraro de UEA, ke la jubilea vervo pludaŭru ankaŭ dum la venontaj jaroj. Notindas, ke ankaŭ la estrarano respondecas pri la landa agado, s-ro J.L. Texier, faris sian eblon por plifortigi la ligojn ne nur inter la landaj asocioj kaj UEA sed ankaŭ inter unuopaj landaj organizaĵoj. Tiucele oni dum la Kongreso en

ESPERANTO '88 ● 27 nov.-4

Internacia konferenco por la evol

VOJAĜOJ EL EŬROPO:

Flugu de via plej proksima internacia flughaveno tra Madrido:

Amsterdamo 1827 gld.

Frankfurto 2362 gld.

Kopenhago 2169 gld. (+ imposto)

Londono (Heathrow) 2036 gld.

Parizo (Orly) 2104 gld.

Foriro posttagmeze 26 nov.,
reveno tagmeze 5 dec.

La flugo rekte el **Madrid**
kostas nur 1668 gld.

LOĜADO EN

Delegito: 1-a k
gld., 2-a katego

Kunulo: 1-a ka
gld., 2-a katego

La prezoj inkluzi
sono 8 tagojn ka
kun loko en 2-lit
matenmanĝo ka
("duonpensiono

Varsovio nomis kontinentajn kunordigantojn/respondeculojn; tiuj kunordigantoj apenaŭ sukcesis ekfunkcii en la dua parto de 1987, sed streboj tiurilataj daŭras ankaŭ en 1988.

2. Regiona agado — Azio: Pro la grandega donaco de 30 milionoj da enoj (pli ol 400000 gld.) frue en 1987 por la disvastigo de la Movado en Azio, tiu kontinento ricevis apartan atenton dum la jaro. La Estraro komisiis s-ron Umeda fari esplorojn kaj sondojn kiel bone utiligi la malavaran donacon. Tial s-ro Umeda dum 1987 vizitis plurajn aziajn landojn (Ĉinio, Hinda Unio, Korea Respubliko, Pakistano) kaj kunvenigis fine de aŭgusto en Tokio la unuan Azian Konferencon de UEA. Kvankam la Estraro intertempe decidis provizore ne investi tiun donacon en konstruon de aparta Esperanto-centro en iu azia lando, la donaco generas interezon de preskaŭ 20000 gld. jare, el kio oni planas subvencii la plej valorajn iniciatojn en Azio. D-ro U. Lins, kiu profesie vojaĝis al kelkaj aziaj landoj, provis starigi movadajn kontaktojn tie. Vigliĝis agado en Turkio, kie la movado sukcesis produkti novan vortaron, kaj en Pakistano, kie nacia lingvoinstituto aŭspiciis vortaron kaj lernolibron en la urdua.

El Soveta Unio venis nenia oficiala novaĵo pri planoj aliĝi al UEA, sed la Movado tie daŭre ekspansias kaj notas multajn kaj altkvalitajn sukcesojn. Grandaj sovetiaj karavanoj ĉeestis kaj UK kaj IJK en Pollando. Precipe el la

baltaj respublikoj daŭre venas novaj kaj belaj libroj en Esperanto. La situacio en Rumanio ne klariĝis dum la jaro malgraŭ la provoj kontakti rumanajn diplomatajn reprezentantojn. Ŝajnas, ke fariĝis eble paroli publike pri Esperanto en Albanio, sed estas tro frue por fari definitivon raporton.

3. Regiona agado — Afriko: Du monatojn de 1987 ĉ. 15 afrikaj esperantistoj pasigis en Eŭropo por finpoluri sian lingvo-uzon kaj kapabliĝi instrui Esperanton. Ili unue pasigis monaton en Hungario en intensaj kursoj kaj seminarioj, por poste ĉeesti la kongresojn en Krakovo kaj Varsovio kaj la festivalon en Zagrebo. Hans Bakker, kiu jam de jaroj gvidas la agadon en Afriko, trovis manierojn kovri la vojaĝkostojn, dum UEA certigis la restadon en Eŭropo. Tio estis granda financa streĉo, sed ĝi ankaŭ estis tre

1988 ● Havano, Kubo le Esperanto en Iberameriko

NO:	PROGRAMO:
rio 866 5 gld.	● Prelegoj kaj diskutoj kun elstaraj figuroj de la Movado;
o 766 5 gld.	● Interŝanĝo de spertoj kaj ideoj por movada kunlaboro;
or ĉiu per- oktojn, ibro, manĝo insporto.	● Artaj kaj distraj aranĝoj en amikeca, internacia etoso;
	● Vizitoj al historiaj kaj aliaj turismaj lokoj en Kubo.
	Certigu vian partprenon en ĉi tiu unika aranĝo. Mendu ĉe UEA, Roterdamo.

kuraĝiga kaj inspira, tiel por la afrikanoj mem kiel por la esperantistaro en la landoj, kiujn la grupo vizitis. Similan entreprenon oni faros ankaŭ en 1988 kaj en la postaj jaroj, kion nun povas helpi speciala konto de Triamonda Kongresa Fondaĵo. La afrika agado intertempe kreskis en tre intensan kaj ekstreme laborpostulan entreprenon. Feliĉe, kunhelpas aro da unuopuloj kaj manpleno da landaj asocioj. Restas tamen spaco por pliaj helpantoj, ĉu unuopuloj, ĉu organizaĵoj. Bonvenas ankaŭ monkontribuoj por la Fondaĵo Afriko, ne nur pro tio ke ili grave kunhelpas finance, sed ĉar ili montras la necesan movadan solidarecon. Post Ebura Bordo, kies landa asocio jure registriĝis, nun tio okazis ankaŭ en Benino. Venas diversaj kuraĝigaj informoj el Togolando, Zairio kaj el Madagaskaro, lando kies Esperanto-movado laŭ sia multnombreco povus rivali plurajn eŭropajn aŭ latinamerikajn landojn, kondiĉe ke la diversaj organizaĵoj tie trovu manieron kunlabori je landa nivelo. En 1987 la nova Premio Deguĉi (4000 gld.) prave kaj plenmerite iris ĝuste al Hans Bakker, kiu siavice kaj siastile metis ĝin je la dispono de la ĉiam pli entuziasmiga afrika agado.

13. FAKA AGADO

1. Terminologio: En la jubilea faka agado elstaris la fondo de Terminologia Esperanto-Centro kiel memstara instanco de UEA, dum la 72-a UK en Varsovio (vd. la Jar-

libron 1988/p.30 por informoj pri la nova organizaĵo). Bazita parte sur la terminologia sekcio de la iama Scienca Eldona Centro en Budapeŝto, TEC tamen reprezentas novan etapon en la tiukampa laboro. La 1-a TEC-Konferenco en Varsovio allogis centon da partoprenantoj, el kiuj la plimulto anoncis sin pretaj kunlabori en la pretigo de terminaroj ks. Kvankam estas ankoraŭ frue por taksii la funkciadon de TEC, la zorgaj preparoj por ĝia fondo (sub la ĉefa gvido de Wera Blanke) kaj la multnacieco de ĝia komenca laborbazo aŭguras bonan estontecon.

Tre pozitiva estis ankaŭ la plifirmigo de rilatoj inter la nova TEC kaj Rüdiger Eichholz, gvidanto de la terminologia centro de ISAE, kiu jam de kelkaj jaroj kunlaborigas fakulojn en sia Perkomputora Terminokolekto (Pekoteko). Li kaj la estraro de TEC venis al ĝenerala interkonsento pri reciproka helpo kaj kunagado, tiel ke la TEC-a reto de reprezentantoj kontribuu ankaŭ al Pekoteko. Eichholz, kiu jarfine povis anonci la ekspreson de la longege atendata *Esperanta bildvortaro*, cetere faris vojaĝon tra Eŭropo dum oktobro por varbi pliajn kunlaborantojn kaj prelegi pri la Esperanta terminologio ĉe la 1-a Internacia Kongreso pri Terminologio en Trier, FR Germanio.

En tiu sama aranĝo reprezentigis la nederlanda esplorprojekto DLT, kiu celas evoluigi duon-aŭtomatan traduk-sistemon inter multaj lingvoj per uzo de Esperanto kiel interlingvo. Du artikoloj en la revuo *Esperanto*, en majo 1987 kaj marto 1988, priskribis la progreson dum la Jubilea Jaro, kiu meritas la epiteton "eksterordinara": Fine de la jaro la sistemo trapasis gravan teston, kiu konfirmis ĝian frontan lokon en la internacia konkurado. La ĉefa praktika avantaĝo al la movado ĝis nun estas svarmo da artikoloj kiuj aperis pri DLT en la faka kaj popularscienca gazetaro, kvankam ankaŭ menciindas subvencioj de la esplorfirmao al TEC kaj Pekoteko. Oni povas antaŭvidi multe pli grandajn avantaĝojn por la baldaŭa estonteco.

2. Scienca eldonagado: Sciencaj libroj ne aparte abundis en 1987. La plej grava naturscienca novaĵo aperis ĉe UEA: *Vetero kaj klimato de la mondo*, klasika angla lernolibro tradukita de Kris Long. Terminaroj aperis pri fiziko (E-angla-japana, de Universitato Chubu, Japanio), komputiko (laŭ Pekoteko, vd. supre), kaj matematikostokastiko (Universitato de Oslo); tradukon de kvar normoj de la Internacia Telegrafia kaj Telefonika Konsultiĝa Komitato eldonis C. Bertin (Francio). Krome aperis traduko de la historie grava verko *Filozofio zoologia* de Lamarko ĉe SAT-Broŝurservo. En la sociaj sciencoj elstaris la verko de Umesao, *Sepdek sep ŝlosiloj por la japana civilizo*, kiu — malgraŭ la esperantisteco de sia kompilinto — tradukiĝis el la angla.

La hungara revuo *Fokuso* — posteulo de *Internacia komputado* — definitive survojas establi sin kiel la plej bona nuntempa scienca periodaĵo en Esperanto, kun varia kaj interesa enhavo en kvar numeroj de po 80-100 paĝoj. Plu aperis kaj kvalite pliboniĝis *Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj*, la organo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu fine de la jaro ricevis oficialan sankcion de sia tegmenta organizaĵo. Apud tiuj du nur vegetis la ISAE-organo *Scienca revuo*,

kiu ankoraŭ luktas kun financaj kaj administraj problemoj; *Sciencaj komunikaĵoj* ĉesis aperi, kaj ĝiaj postrestintaj manuskriptoj transiris al *Fokuso*. Ĝojigis tamen la apero de du numeroj de *Geologio internacia*, kiu kutime aperas nur ĉiun kvaran jaron: unu ĉe la Scienca Akademio de Taĝikio en Sovetunio, la alia ĉe Pernambuka Esperanto-Asocio (Brazilo) sub la aŭspicio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

En la serio *Esperanto-dokumentoj* aperis anglalingva versio de pli frua broŝuro en Esperanto: "The Language Problem in Science and the Role of the International Language Esperanto". Pretiĝis kelkaj nacilingvaj tradukoj de "Esperanto—lingvo de la natursciencoj kaj tekniko", kiun kompilis O. Haszpra en 1986; frue en 1988 la verko aperis kiel plia E-dokumento kaj en kelkaj nacilingvaj revuoj.

3. Faka aplikado de Esperanto: Kvankam ISAE restis pli-malpli dormanta en 1987, dume kreskis la agado de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Tiu sukcesis fincertigi sian juran statuson kaj regularon kaj organizis la kvaran Sanmarinan Universitatan Semajnon en septembro, al kiu aliĝis ĉ. 80 sciencistoj el multaj landoj. La Internacian Sciencan Akademion Comenius, kiu ankoraŭ kolektis manuskriptojn por sia unua almanako, trafis terura bato fine de 1987 kiam mortis ĝia fondinto kaj prezidanto Paul Neergaard (13 novembro) kaj nelonge poste ĝia vicprezidanto Ivo Lapenna (15 decembro). Nekrologoj pri tiuj du elstaraj sciencistoj kaj aktivuloj aperis en la decembra kaj februara (1988) numeroj de la revuo *Esperanto*.

Sur la kampo de ekologio, ne nur aperis la kolosa kompilaĵo *Antaŭ la nova jarmilo*, redaktita de W. Gunther (FR Germanio), sed fondiĝis esperantista ekologia komunumo en Francio, Mondhejmo (*Esperanto* 1987/p.207). Samkampe frapas la aktivado de sovetianoj, kiuj forte reprezentiĝis en naciaj agadoj kiel la naturprotektata ekspedicio "Dnestr-86" kaj la Internaciaj Ekologiaj Laboragoj.

La esperantistaj fervojistoj kongresis internacie en Katowice, Pollando, kaj anoncis la baldaŭan pretiĝon de nova fervoja terminaro en Esperanto. Jam dum 1987 aperis grava aldono (CIV) al la antaŭe tradukita konvencio pri la internacia fervoja trafiko (COTIF), eldonita de la germana IFEF-sekcio. Kelkaj landaj sekcioj de IFEF organizis propran kongreson, kio montras la relativan forton de la fervojistoj kompare kun aliaj fakoj (kvankam malkreskis ekzemple la hungara filio).

Memstaran fakkongreson organizis ankaŭ la asocioj por blinduloj (Varsovio), katolikoj (Ĉenstoŝovo), filologoj (Sofio), medicinistoj (Krakovo), ŝakistoj (Siedlce) kaj instruistoj (Lodzo). Plimulto de la aliaj fakaj asocioj organizis jarkunvenon kadre de la varsovia UK. Tie krome fondiĝis, fine de modela dutaga konferenco, Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo (IKEO), kiu poste proponis kunlaboron kun UEA. Stariĝis ĉe la brita jubilea kongreso Societo por Studo pri la Historio de Esperanto, kiu jam eldonis la unuan numeron de sia faka revuo, *Historiaj studoj*. Alia promesplena novulo inter la fakaj gazetoj estas *Evangeliaj kajeroj*, sendependa serio de ĉ. 80-paĝaj artikolaroj pri difinita temo el diversaj religiaj vidpunktoj.

Se temas pri ekstermovada reprezentiĝo, oni devas menci la seminarion de Esperantlingva Verkista Asocio kadre de la 50-a monda PEN-kongreso en Svislando en majo. EVA ĉi-foje malakceptiĝis kiel aparta PEN-sekcio, sed esperas sukcesi en 1988.

En 1987 malfondiĝis la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj Budhana Ligo Esperantista; okazas provoj restarigi (alinome) la unuan.

4. Faka pristudo de Esperanto: 1987 estis sen ajna dubo mejloŝtona jaro por la esperantologio kaj interlingvistiko ĝenerale. Parto de tiu agado estas registrita sub ĉapitro 14 pri CED, sed ĉi tie notindas kelkaj kromaj faktoj. La Jubilea Konferenco kiun organizis prof. d-ro Ivo Lapenna kaj d-ro Klaus Perko en la aŭstria urbo Graz allogis elstarajn prelegantojn pri esperantologiaj temoj; ĝiaj aktoj aperos kiel libro, verŝajne en 1989. En Francio, Pollando kaj Bulgario okazis internaciaj konferencoj kaj kunvenoj kun esperantologiaj trajtoj. Plue, ĉe la 14a Internacia Kongreso de Lingvistoj en Berlino, GDR, estis interlingvistika "ronda tablo" kiun kunorganizis d-roj Detlev Blanke, Ronald Löttsch kaj Sergej Kuznecov. Tio estis la unua fojo post 1948 ke Esperanto eniris la kongresan programon; la referaĵoj verŝajne aperos en presita formo.

La eldona kampo cetere mirige viglis. Ĉe la Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj) aperis la dua volumo (*Esperantismo*) de la *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*: esperantologiaj eseoj de 58 aŭtoroj sur preskaŭ 800 paĝoj. Pere de la brazila eldonejo Fonto, la Akademio de Esperanto produktis propran festlibron, *Centjara Esperanto*, al kiu kontribuis 16 el ĝiaj membroj. Alian altkvalitan studaron (plejparte nacilingvan, notinde) eldonis la neesperantista lingvo-organizaĵo AIMAV sub la redakto de d-ro Michel Duc Goninaz: *Studoj pri la Internacia Lingvo*. Tiuj tri volumoj kune fiksas novajn normojn en la esperantologio, kiu tiel "komencis alporti sian plenan rikolton" (Tonkin en la Régulo-libro).

Du verkoj de individuoj, ambaŭ aperintaj en Japanio, meritas apartan mencion. Itô Kanzi (Ludovikito), la senlaca kompilanto de la Plena Verkaro de Zamenhof, reeldonis la unuan verkon de la serio (*Unuaj libroj por esperantistoj*, 1973) kaj aperigis novan eron (la 17an), *Ludovikologiaj biografieto*. Ĉe Nagoya Esperanto-Centro eldoniĝis, post pli ol tridekjara laboro, la monumenta konkordanco *Zamenhofa ekzemplaro* de Rihej Nomura.

14. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

La jaron karakterizis tre pozitivaj evoluoj sur la kampo esploro kaj dokumentado: la lingva problemo ĝenerale kaj Esperanto specife fariĝas ĉiam pli kaj pli akceptata temo de scienca studado inter fakuloj pri lingvistiko kaj rilataj temoj. La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) estas daŭre gvidata de sia direktoro, d-ro Humphrey Tonkin, kaj okmembra estraro. S-ro Ryszard Rokicki (Akademia Centro Interlingvistika, Varsovio), estrarano de CED, redaktas la bultenon *Informilo por interlingvistoj*, kiu donas bazajn informojn pri novaj eldonaĵoj, konferencoj, ktp., kaj estas senpage ricevebla por esploristoj per alskribo al la CO de UEA.

La dekunua volumo de la revuo de CED *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj

lingvoplanado, LPLP) aperis ĉe la eldonejo de la Universitato de Teksaso (Usono) en tri numeroj sub redakto de d-ro Tonkin kaj vicredaktoroj d-ro Frank Nuessel kaj d-rino Karen Johnson-Weiner. La unua numero, sub la ĝenerala temo “Lingva egaleco”, estis gastredaktita de d-ro Jonathan Pool kaj rikoltis apartajn laŭdojn inter fakuloj. La anglalingvaj artikoloj enhavis 10 kontribuojn pri Esperanto kaj esperantismo de David Jordan. La tria numero, honore al la Jubileo, estis aparte dediĉita al Esperanto, kun artikoloj i.a. de Detlev Blanke (pri la termino “planlingvo”) kaj Probal Daŝgupto (pri la Esperanto-kulturo). Iom tro forta estis la reprezentiĝo de la angla lingvo en la numeroj de 1987, sed aperis materialo ankaŭ en aliaj lingvoj kaj ampleksaj resumoj en Esperanto akompanis ĉiujn artikolojn.

La aktoj de la kvina jara konferenco de CED, *The Economics of Language Use*, aperis en Novjorko en la angla lingvo kun resumoj en Esperanto. La sesa konferenco, kiu traktis la temon “Lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj”, estis escepte sukcesa: ĉeestis ĝin pli ol cent homoj, inkluzive de la nuna ĝenerala subsekretario de UN s-ro Diego Cordovez kaj lia antaŭulo Sir Brian Urquhart. Kiel kutime, la konferenco okazis en Novjorko en decembro en kunlaboro kun la Traduka Fakto de Unuiĝintaj Nacioj. Raporto aperis en la februara numero de *Esperanto*. En majo CED organizis similstilan konferencon, denove en kunlaboro kun kolegoj ĉe UN, sed pri tute alia temo: “Lingvo en religio”. Tiu semajnfina aranĝo okazis en la Kolegio Bergen, apud Novjorko. La aktojn de ambaŭ konferencoj oni eldonos en 1988.

Tute escepta estis la ĉi-jara Esperantologia Konferenco de CED, kiu okazis dum la Universala Kongreso en Varsovio. Ĝi konsistis el kvar ĉefaj prelegoj de elstaraj esperantologoj pri la historio (Ulrich Lins), kulturo (Neil Salvesen), lingvistiko (John Wells) kaj sociologio (Detlev Blanke) de Esperanto. Ĉiun prelegon ĉeestis kvincento da atentaj aŭskultantoj, kaj la tuton efike kunordigis s-ro Rokicki. Ankaŭ aparte interesa estis la en Vieno okazinta simpozio “Esperanto 100-jara”, kiu kunigis centon da interlingvistoj kaj esperantologoj el diversaj landoj en kaj ekster Eŭropo en la tiea universitato en oktobro. La simpozio, kiu okazis sub aŭspicio ne nur de CED sed de diversaj aŭstria edukaj kaj registaraj instancoj, etendiĝis tra tri dense programitaj tagoj de altnivelaj prezentoj (kiuj aperos baldaŭ libroforme). Tiu ĉi estis la lasta el kvar jubileaj esperantologiaj konferencoj sub aŭspicio de CED: la antaŭaj okazis en Parizo, Novjorko kaj Tokio en 1985 kaj 1986. La aktojn de la pariza kaj novjorka oni jam eldonis: en 1987 sekvis la aktoj de la tokia konferenco, pri “Socilingvistikaj aspektoj de la Esperanto-movado”, kiuj aperis libroforme en Tokio kaj estas haveblaj de la Libro-servo de UEA.

